

& Averta:

< Rekante 27 el 53 batoj por strofo, entute 265 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per polsa melodio sveda, kun takta modifo, kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:53> (# Sparven lilla:

a;Ti /Tido LaSi MiiSiSi Tido LaSi MiiSi;Si Tido LaSi MiiSiSi Timi miri mi mi;Ti Tido LaSi MiiSiSi Tido LaSi MiiSi;Si Tido LaSi MiiSiSi Timi miri mi mi

(#Rekantaĵe: do Lado mimi reTi SoTi re;Ti do Lado mimi reTi SoTi re;Ti do LaSi MiMi SiMiSi La La a;Ti do LaSi MiMi SiMiSi La Tido LaSi La)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 Vi /estas vendistino en urba magazeno ; Kaj de ŝminkaĵoj pruntas la sanon de l' vizaĝo, ; Ĉu tial vi forgesis pri hejmo kaj deveno ; Dum via patro tondas la hundojn de l' vilaĝo?

(×:; **Plaĉas la ritmo de rakonto ĉi ; kaj maĉas la vortojn de l' rekanto ni ; ĉar saĝe rakontas la baladestro ; kaj dume renkontas ja la dancantojn de l' ĉeno mi.**)

'2 Se foje – tre malofte – parade vi revenas ; Al hejma kabaneto tagmezon dum dimanĉo, ; Afekte ĝian lingvon jam ne plu vi komprenas ; Kaj honte vi ignoras eĉ trajtojn de l' fianĉo.

'3 Mi amas vin, Salika, – mi rajtas do riproĉi, ; Ke vi la nazon portas tro super la nivelo, ; Ke vi aspektas kvazaŭ vi celus tuj dekroĉi ; Per aroganta movo la stelojn de l' ĉielo.

'4 Fiera vendistino, vin kaptis iluzio ; Kaj vane vi esperas plenumon de l' miraklo, ; Ĉar ĉe l' altara pompo de via falsa dio ; Vi genufleksas antaŭ malplena tabernaklo.

'5 Revenu sur la vojon signitan de l' destino, ; Forgesu kavajn vortojn de danda kavaliro, ; Ĉar kiam rozoj velkos, – la dornojn, vendistino, ; La kavaliro lasos al simpla.. kala viro.)